

Prelego Emilio 20260129: rilato inter lingvoj kaj pensoj

Iam okazis biciklada konkurso en Italio inter pluraj landoj. Belgio finis dua (preskaŭ la unua), kaj Francio estis antaŭlasta. Sed... nur du landoj partoprenis. Ĉu vi komprenis?

Eĉ en iuj magiaj trukoj, viaj pensoj estas gvidataj de certa vortuzado. Ekzemple, se mi diras, ke mi elektos unu ludkarton, montrante al iu ajn piko kaj iu ajn reĝo, ĉiuj en la aŭdantaro supozas, ke la pikreĝo estas en la kartoludaro, kiam la pikreĝon povus jam esti ie alie. =>duobla realeco

Lingvo ankaŭ gravas por vendistoj. En vendotrejna kurso, la uzo de certaj vortoj estis malpermesita. Konstante petante aliajn respondi "jes" al bagatelaj demandoj, vi certigas, ke iliaj pensoj estas turnitaj laŭ konfirmita maniero. Tiam vi povas demandi:

"Vi portas belajn vestaĵojn, ĉu?" "JES!"

"Sed mi vidas ke vi havas malpli da tempo, ĉu?" "JES!"

"Ĉi tiu produkto povas ŝpari al vi multan tempon. Ĉu vi ne ŝatus ŝpari tempon?" "JES!"

"Do vi estas konvinkita, ke vi volas aĉeti ĉi tiun produkton?" Aŭtomata jesa respondo sekvas.

La vendistoj uzas potencaj vortoj por atingi pozitivan psikologian respondon:

- **Vi:** Igu ĝin persona. La kliento devus vidi sin mem uzante la solvon.

- **Ĉar:** Homoj pli emas akceptos ion, se oni donas kialon, kiom ajn simpla ĝi estas.

- **Nove:** Ĉi tio ekigas scivolemon kaj timon esti postlasita.

- **Komforto:** en okupata mondo, ŝpari tempon aŭ forigi la ĝenon estas grandega motivigilo

Bona vendisto fokusiĝas al avantaĝoj anstataŭ trajtoj:

Ne diras: "tiu komputilo havas baterion de cent kilowathoroj.", sed "Per ĉi tiu baterio vi povas labori senĝene la tutan tagon sen devi serĉi elektran konektilon."

Aŭ la subtila alĝustigo de la vortoj:

Uzi **Investo** anstataŭ **prezo/kosto**: kostoj estas perdo, investo donas ion.

Anstataŭigu **aĉeti** per **administri/posedi**: aĉetado sentas kiel elspezado de mono; posedado sentas kiel riĉiĝo

Anstataŭigu la vorton **problemo** per **defio** (uitdaging): defio estas io, por kio oni estas motivita trovi solvon

Uzu vortojn, kiuj indikas urĝecon kaj malabundecon (schaarste):

Provizora oferto (tijdelijk aanbod): stimulas rapidan decidiĝon

Ekskluziva: donas al la kliento la senton de aparteno al elektita grupo.

Nur havebla ĉi tie aŭ **nur havebla ĉi-semajne**: igas la produkton pli valora per limigita havebleco

Nur pozitiva vortuzado: ne uzas vortojn kiel nenio kaj ne

Uzu la lingvon kaj manierojn de la cela publiko

Uzu la samajn vortojn kiel la kliento: diferenco inter sofo kaj kanapo:

kiam la kliento diras "sofo", vi diras "estas sofo";

kiam la kliento diras "kanapo", vi diras "tio kanapo estas tre komforta".

En Japanio, hierarkio gravas: oni uzu pli ĝentilan lingvaĵon kun pli maljuna persono ol kun pli juna. Tial ekzistas malsamaj vortoj por pli maljunaj kaj pli junaj gefratoj:

maljuna frato: **oniisan**, maljuna fratino: oneesan

juna frato: ootoo, juna fratino: imotoo

Sed en konversacio kun alia familio, aĝo malaperas kaj ĝentileco transiras al la alia familio:

propra filo: musuni, filo de alia familio: musunisan

propra filino: musume, filino de alia familio: musumesan

propra infano: kodomo, infano de alia familio: **onisan**

Atentu la diferenco inter oniisan (maljuna frato) kaj onisan (infano de alia familio).

Kvankam ekzistas nomo por verda koloro (midori), en Japanio verda trafiklumo aŭ verda arbaro nomiĝas blua (aoi).

Tiel ankaŭ, por la nederlanda lingvo, helblua kaj malhelblua estas variaĵoj de la koloro blua, sed por rusaparolantoj, helblua (goloeboj en ruslingvo) kaj malhelblua (sini – tuta malsama vorto) estas tiel malsamaj koloroj kiel ruĝa kaj rozkolora estas por nederlanda parolantoj.

En la maŭdua lingvo, indiĝena amerika lingvo el Norda Kalifornio, nur tri vortoj estas haveblaj por priskribi la kolorspektron. Ili dividas la spektron jene (la donitaj Esperantaj vortoj estas la plej bonaj aproksimadoj): **lak** (ruĝa), **tit** (verdblua), **tulak** (flava-oranĝ-bruna).

Kvankam homoj kapablas fari 7.500.000 malsamajn kolordistingojn en la videbla kolorspektro (Boring, 1957), denaskaj parolantoj de la maŭdua lingvo tipe grupigas sian sperton en la tri kategoriojn, kiujn ilia lingvo ofertas. Ĉi tiuj

tri maiduaj kolorterminoj kovras la saman gamon da realmondaj perceptoj kiel la ok (specifaj) kolorterminoj de la angla. La afero estas, ke maidua parolanto tipe konscias pri nur tri kategorioj de kolorspekto, dum anglalingvanoj havas pli da kategorioj kaj tial pli oftajn perceptajn distingojn.

Ĉi tio signifas, ke dum anglalingvanoj priskribas sian sperton pri du objektoj kiel malsamaj (flava libro kaj oranĝkolora libro), maiduaj parolantoj tipe priskribas sian sperton pri la sama situacio en la reala mondo kiel la saman (du tulakaj libroj).

Fakte, el pure lingva perspektivo, la Maidua lingvo havas nur du vortojn por priskribi la kolorspektron: **lak** kaj **tit**. La tria vorto prezentita en la teksto estas kompleksa kaj konsistas el du signifoplenaj partoj aŭ morfemoj: **tu** - urino kaj **lak** – ruĝa.

Alia afero estas, ke ni ludas kun niaj pensoj kaj foje konfuzas la malĝustajn konceptojn: nome, sensacion kaj aĵon. Prenu, ekzemple, la oftan frazon: "La libro estas blua." Blua estas la nomo, kiun ni, kiel denaskaj parolantoj de Nederlanda lingvo, lernis uzi por priskribi nian sperton pri aparta parto de la videbla lumkontinuo. Misgvidite de la strukturo de nia lingvo, ni supozas, ke blua estas eco de la objekto, kiun ni nomas libro, anstataŭ la nomo, kiun ni donis al nia sensacio.

Dum en la nederlanda ni distingas inter arbo (boom), ligno (hout) kaj arbaro (bos), La franca kaj la angla ne distingas inter la lastaj du vortoj: arbo (arbre kaj tree), sed bois (wood) signifas kaj lignon kaj arbaron en la franca kaj angla lingvo. En la hungara kaj rusa oni nur havas unu vorto por la arbo kaj la ligno: "fa" en Hungara lingvo kaj "djerevo" en la rusa lingvo.

Do en la franca kaj angla havas ligno kaj arbaro la saman vorton, kaj en la hungara kaj rusa havas la ligno kaj la arbo la saman vorton.

Ankaŭ multe okazas kun niaj pensoj pri tempo

Ni pensas pri tempo kiel io lineara kaj ne-ripetiĝanta. Hopioj havas tute malsaman mondkoncepton ol la hindeŭropa (Indo-Europees): por ili, tempo estas cirkla.

Dum la japana havas nur pasintecon kaj prezenco, la nederlanda lingvo havas 8 verbtempojn (Esperanto eĉ havas 9 verbtempojn).

Sed ekzemple en la nederlanda lingvo oni povas uzi la prezenco por esprimi estontan agon: "Ik kom morgen wel even langs".

Aŭ uzu ŝajnan estontecon por io, kio kaŭzas surprizon NUN: "Het zal je maar gebeuren".

Aŭ la pasinta tempo por ŝajni pli ĝentila: "Hoe was uw naam ook alweer?".

Provu klarigi tion al iu, kiu parolas alian lingvon.
La nederlanda lingvo estas malfacile.

Ankaŭ la karatiâna lingvo, kelkcent parolantoj en norda Brazilo, havas same kiel la japana nur pasinteco kaj kunmetitajn nunon kaj estonteco (sama finaĵo kaj vorto).

La jukateka majao parolata en la jukatana duoninsulo de Meksiko ne havas verbtempojn: "tũmben lenaho" signifas, ke ambaŭ, la domo estis nova, la domo estas nova, kaj la domo estos nova.

Kaj la jagua lingvo, parolata en Peruo, havas pliajn verbtempojn.
En tiu lingvo oni povas uzi konjugaciojn por indiki ĉu io okazis antaŭ longe, ĝis antaŭ unu jaro, ĝis antaŭ unu monato, ĝis antaŭ unu semajno aŭ lastatempe.

Lingvo ankaŭ ŝajnas formi nian pensmanieron pri tempo laŭ aliaj manieroj.
Ekzemple, la nederlanda lingvo ŝatas trakti tempon kiel spacan dimension, tra kiu oni povas promeni.

En ĉi tiu kazo, la pasinteco ĉiam estas malantaŭ vi kaj la estonteco ĉiam estas antaŭ vi. Nur pensu pri frazoj kiel "die lastige periode ligt achter ons " aŭ "ik ga een mooie tijd tegemoet".

Ĉi tiuj metaforoj kongruas kun nia efektiva moviĝado: ni antaŭeniras, kun la paŝoj, kiujn ni faris, malantaŭ ni kaj la paŝoj ankoraŭ farendaj antaŭ ni.
Ĉio ŝajnas kredinda.

Ke aferoj povas esti faritaj alimaniere pravas la ajmara lingvo, unu el la naciaj lingvoj en Bolivio kaj Peruo.

En ĉi tiu lingvo, la pasinteco estas antaŭ vi kaj la estonteco estas malantaŭ vi.
Tiel same komprenebla.

La pasinteco estas antaŭ vi ĉar vi jam spertis ĝin kaj tial povas vidi ĝin. La estonteco estas malantaŭ vi ĉar vi ne spertis ĝin kaj tial ne povas vidi ĝin.
Ekzemple, en la ajmara lingvo la frazo "nayra mara" signifas "pasintjare", sed ĝi povas esti laŭvorte tradukita kiel "la jaro, kiun mi povas vidi".

Tiaj diferencoj, cetere, etendiĝas preter lingvo. Esploristoj analizis konversaciojn en la ajmara kaj la hispana: homoj parolantaj la hispanan lingvon gestadis antaŭen kiam ili diskutis pri la estonteco kaj malantaŭen kiam ili diskutis pri la pasinteco.

Homoj, kiuj parolis la ajmaran lingvon, gestadis malantaŭen kiam ili parolis pri la estonteco kaj antaŭen kiam ili parolis pri la pasinteco.

Do temas ne nur pri malsamaj vortoj aŭ metaforoj, sed vere malsama koncepto pri tempo.

Ni ankaŭ agas dum ni uzas lingvon. Petu nederlandanon aŭ anglon kronologie aranĝi fotojn de homoj maljuniĝantaj, kaj ili aranĝos ilin de maldekstre dekstren. Parolantoj de la araba aŭ hebrea lingvoj aranĝas la bildojn de dekstre maldekstren. Ĉi tio estas la legdirekto de ilia lingvo.

Sed parolantoj de Kuuk Thaayorre, sur la Kabjorka Duoninsulo de Aŭstralio, faras ĝin de maldekstre dekstren, aŭ inverse, kaj de supre sube, aŭ inverse, ŝajne hazarde.

Ĝis vi komprenas, ke la suno gravas.

Parolantoj de Kuuk Thaayorre asocias la orienton (kie la suno leviĝas) kun la pasinteco kaj la okcidenton (kie la suno subiras) kun la estonteco.

Kiel ili aranĝas la fotojn dependas de la direkto, kiun ili rigardas - ĉar ili faras tion konstante de oriento al okcidento.

Parolantoj de la nederlanda lingvo uzas tion, kion oni povus nomi egocentra modelo de tempo. La maniero kiel tempo estas indikita dependas de la parolanto: "pli frue" ĉiam estas maldekstre de ili, kaj "pli poste" ĉiam estas dekstre de ili.

Parolantoj de la Kuuk Thaayorre, aliflanke, uzas tion, kion oni povus nomi geocentra modelo de tempo. La sento de tempo dependas de la ĉirkaŭaĵo: pli frue ĉiam estas oriente, pli malfrue ĉiam estas okcidente.

Lingvoj diferencas unu de la alia, kaj tio diras ion pri kiel parolantoj interpretas la mondon, kaj ke aliaj lingvoj vidas la mondon malsame. Tial, lerni aliajn lingvojn permesas al ni sperti ĉi tiujn diferencojn kaj riĉigi nian pensadon.

La maniero kiel homoj pensas, perceptas la mondon kaj klasifikas fenomenojn estas kaŭze determinitaj aŭ influitaj de la lingva sistemo.

Esplorado pruvis, ke parolitaj vortoj estas potencaj kaj havas signifan efikon sur vian pensmanieron. Doni al iu komplimenton metas rideton sur ilian vizaĝon. Nomi iun malbone povas kaŭzi koleron.

Du grupoj da studentoj estis petitaj krei frazojn: la unua kun vortoj kiel "maljuniĝanta", "griza hararo", "promenbastono" kaj "avino kaj avo", la alia grupo kun "kurado", "sporto", "rapideco" kaj "viveco".

Poste ili devis laŭvice eliri eksteren kaj marŝi ĝis la fino de la koridoro kaj reen. Rezultis, ke la unua grupo marŝis pli malrapide ol la dua grupo.

La sama eksperimento kun la vortoj "amo", "amikeco" kaj "ligo" kontraŭ "posedaĵo", "enspezo", "mono" kaj "ŝuldo".

La dua grupo montriĝis pli malsociema ol la unua:

- daŭris pli longe por ili helpi aliajn en la grupo
- se la eksperimentisto ŝajne senkonscie faligis kelkajn krajonojn sur la plankon, tiuj en la dua grupo malpli prenis ilin.
- kiam oni diris al ili tiri seĝon por fremdulo, tiuj en la dua grupo movis ĝin pli for de si ol tiuj en la unua grupo (preskaŭ kvardek centimetroj).

Estas plurfoje pruvite, ke vortoj senkonscie influas nian konduton, ĉu pozitive ĉu negative. Vortelektio ĉiam faras diferencon, eĉ se ni ne konscias pri tio.

Vortoj kaj pensoj povas esti malfortigaj. Vortoj ankaŭ povas inspiri amon, solidarecon kaj kunlaboron por pli estonteco-amika mondo. Elektu viajn vortojn kaj pensojn konscie, ĉar ili utilas al ni ĉiuj.